nia voĉo

madrida esperanto-liceo julio/aŭgusto 2021

## ESPERANTISTA AGADO EN LA RETO

Alvenis denove la tradicia sezono por esperantistaj renkontiĝoj en la tuta mondo, ĉijare denove translokigita preskaŭ komplete al la reto. Ne mankas do ŝancoj por ĝui la esperantistan kulturon kaj etoson, eĉ se virtuale. Jen kelkaj ideoj por la venontaj du monatoj:

La Somera Esperanto-Studado (SES) estas internacia kurso, tre bona okazo por lerni kaj praktiki Esperanton, kiu okazos rete de la 2a ĝis la 11a julio 2021. Pliajn informojn ĉe: https://ses.ikso.net/2021/.

La dua Virtuala Kongreso de Esperanto (VK), organizata de Universala Esperanto-Asocio, okazos de la 17a ĝis la 24a de julio, sub la temo: “Paco kaj konfido: universalaj valoroj”. Eblas atingi la unuajn informojn, en la retejo https://vk.esperanto.net/. Jam pli ol mil homoj aliĝis al ĝi.

La Internacia Junulara Kongreso de Esperanto, IJK, okazos ĉijare kiel reta evento inter la 30a de julio kaj la 8a de aŭgusto. Vidu detalojn: https://ijk2021.tejo.org/.

SAT festos sian 100-jariĝon per la 94a SAT-kongreso, inter la 25a de julio kaj la 1a de aŭgusto 2021. La tuta programo estos alirebla rete, kvankam vojaĝantoj al Bjalistoko povos partopreni ĉeestajn aktivadojn. Informoj: https://satesperanto.org/.

ILEI lanĉas virtualan Kongreson, la 54-a - ILEI Kongreso (VEKI 2) inter 7 kaj 14 de aŭgusto 2021, kune kun ILEI-simpozio pri “Esperanto en universitataj medioj – nuntempo kaj estonteco”, en kiu prelegos interalie nia samregionano Manuel Pancorbo pri “Utiloj kaj defioj de neĉeesta lernado kaj instruado”. Pliajn informojn: https://www.ilei.info/.

Kastelo Grésillon (Greziljono, Esperanto-kulturomo en la centro de Francio) proponas diversajn aktivaĵojn por la somero: tri Esperanto-kursojn inter la 23a de julio kaj la 2a de aŭgusto 2021. Aldone serio da IEK- kaj AMO-prelegoj, ekskursoj kaj la eblo ekzameniĝi. Instruos Ilona Koutny el Poznan, Renée Triolle el PACA kaj Marc Giraud el Parizo. Junulara FESTeto prepariĝos por la 13a ĝis 20a de aŭgusto. Naturistoj bonvenos en la Verda Naturista Semajno post la festivalo FestiNATUR' komence de julio. Ĉiujn eventojn de Greziljono vidu en la agendo: https://gresillon.org/agendo.

Fine kaj ĉeeste, la 88-a Itala Kongreso de Esperanto okazos en Asizo, 20–27-a de aŭgusto 2021. Pliaj informoj: https://kongreso.esperanto.it.

Memoru ankaŭ ke la 79a Hispana Kongreso de Esperanto okazos ankaŭ virtuale, la 2an kaj 3an de oktobro 2021. Pri ĝi ni informos pli detale en venonta numero.

Pri tiuj kaj multaj aliaj renkontiĝoj en la tuta mondo, vizitu https://eventaservo.org/.




## RENKONTIĜOJ EN LA PARKO

Kiel ni informis pasintmonate, ni revenis al la ĉeestaj renkontiĝoj, en la parko Retiro. Bedaŭrinde la vetero fine ne akompanis nin, kaj la nombro da ĉeestintoj estis malalta (tamen plej adekvate pro la sanitaraj konsiloj).

En julio ni planas denove rendevui en la sama loko, kiel daŭrigo de la unuasabataj renkontoj. Bv do noti la informojn: la 3an de julio, je la 18,30 horo, en la Parko Retiro. La renkontiĝejo estos la statuo de Ricardo Codorniu, proksime al la Vitra Palaco (*Palacio de Cristal*). Ne zorgu: ni kuniĝos en malgrandaj grupoj, kaj tre atentos la kriteriojn pri KOVIM-prevento.

## CIVITANA INICIATO PRI LA ESTONTO DE EŬROPA UNIO

Memoru ke ankoraŭ restas malfermita la civitana dialogo, kiu estis oficiale lanĉita antaŭ kelkaj semajnoj kadre de la Konferenco pri la estonteco de Eŭropa Unio, per kiu la eŭropuniaj civitanoj estas invitataj proponi kaj diskuti ideojn, kiamaniere la EU evoluu. Vi povas trovi retan platformon por civitana kundiskuto, pere de la adreso: https://futureu.europa.eu/ (legebla en ĉiuj 24 oficialaj lingvoj de EU).

Vi povas trovi tie pliajn proponojn de diversaj civitanoj, rilate al la lingva organizado de la EU, pluraj el kiuj rilatas al Esperanto. Serĉu ilin pere de la interna serĉilo, apogu kaj komentu. Kaj jen iuj proponoj, kiujn UEA/EEU aparte rekomendas por apogo:

- https://futureu.europa.eu/processes/Education/f/36/proposals/23893
- https://futureu.europa.eu/processes/OtherIdeas/f/8/proposals/17955
- https://futureu.europa.eu/processes/OtherIdeas/f/8/proposals/5399
- https://futureu.europa.eu/processes/Education/f/36/proposals/260

Ni havas unikan ŝancon influi en la eŭropa politiko.




## TAGO DE ESPERANTO

La 26an de julio oni denove festas la Tagon de Esperanto, en la datreveno de la eldono de la Unua Libro, en 1887.

La esperanta movado kaj komunumo planas utiligi la tagon por diskonigo de la internacia lingvo kaj ĝia nuna vivanteco.

## REELDONO DE LA LERNOLIBRO DE MIGUEL GUTIÉRREZ ADÚRIZ

HEF represis la lernolibron "Esperanto, curso del idioma internacional", de Miguel Gutiérrez Adúriz, ĉar ĝi estis elĉerpita. Ĝi estas la plej sukcesa lastatempa lernolibro de la internacia lingvo por hispanlingvanoj, el kiu vendiĝis ĝis nun pli ol 4000 ekzemplerojn.

La vendoprezo estas 12 € (10 € por HEF-anoj kaj 7€ por grandaj mendoj, ekz. por libroservoj) plus sendokosto.

Tiun libron kaj aliajn por legi kaj praktiki dum la someraj monatoj vi povas aĉeti en la Libroservoj de Madrida Esperanto-Liceo kaj de HEF, kies katalogon vi trovas en la reta adreso: https://www.esperanto.es/hef/index.php/aprender-esperanto/venta-de-libros. Ilin vi povas aĉeti ankaŭ en la sidejo de la strato Rodríguez San Pedro, 13 (sed bv. interkonsenti antaŭ ol alveni, ĉar oni ankoraŭ ne malfermis ĝin ĝenerale por kunvenoj).

## POR PLIAJ INFORMOJ

Por novaĵoj en Madrido, vizitu regule la retejon de MEL http://www.esperanto.es/mel, kaj la retliston https://groups.google.com/g/esperanto_madride/.

En *Fejsbuko* vizitindas la forumo de MEL: https://www.facebook.com/esperanto.madrid/ aŭ la pli ĝenerala https://www.facebook.com/groups/esperanto.madrid/. En la socia retejo Tŭitero (*Twitter*), vi povas trovi nin ĉe: https://twitter.com/LiceoMadrida.

Por informiĝi pri tutmondaj agadoj virtualaj, vizitu la retejon https://eventaservo.org/.

NI DEZIRAS AL ĈIUJ LEGANTOJ PLEJ FELIĈAN SOMERAN SEZONON!

madrida esperanto-liceo

Rodríguez San Pedro 13-3º-7. 28015 Madrid

~~Regulaj kunvenoj lunde je la 18,30 horo en la sidejo~~

http://www.esperanto.es/mel/ madrid@esperanto.es

Redaktas Toño del Barrio Komentojn kaj informojn sendu al niavocho@gmail.com